Díaz-Canel dankas la rekonon de meksika prezidento al Kubo

Havano, jul 7 (RHK) La prezidento de Kubo, Miguel Díaz-Canel, dankis sian samrangulon el Meksiko, Andrés Manuel López Obrador, ?i-merkrede pro lia rekono al la subteno de nia lando en la batalo kontra? Kovim-19 en tiu nacio.

En sia Tviter-konto, la eminentulo anka? parolis pri la intereso esprimita de López Obrador rilate al la procezo ellabori du vakcinojn, kiujn la plej granda insulo de Antiloj evoluigis kontra? ?i tiu malsano, ka?zita de la kronviruso SARS-CoV-2.

Díaz-Canel anka? ripetis la amon de Kubo al Meksiko kaj la volon al duflanka kunlaboro en ?iuj kampoj.

> “Mi dankas la Prezidanton @lopezobrador_, liajn vortojn pri #Kubo kaj lian intereson pri la procezo fari du kubajn vakcinojn. Ni ripetas nian profundan korinklinon por # Meksiko kaj nian volon kunlabori inter si en ?iuj kampoj. pic.twitter.com/bjoise2WqD
>
> — Miguel Díaz-Canel Bermúdez (@DiazCanelB) July 7, 2021

La anta?an tagon, la meksika ?tatestro esprimis sian dankemon pro la helpo ricevita en la plej malfacilaj momentoj de la ekspansio de la pandemio, same kiel sian intereson inter?an?i spertojn en la kampo de vakcinoj, kaj akiri tiujn evoluigitajn de Kubo.

En sia matena gazetara konferenco, López Obrador memorigis, ke la kariba nacio sendis ?iujn sanlaaboristojn petitajn de sia registaro por subteni la batalon kontra? Kovim-19, kaj priskribis la duflankan rilaton kiel tre fratan en ?iuj kampoj.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/263111-diaz-canel-dankas-la-rekonon-de-meksika-prezidento-al-kubo

Radio Habana Cuba